Universala Esperanto-Asocio

**AKTIVULA MATURIGO**

**Estrara Subteamo: MOVADO**

*Estrara Komuniko EKO 2018-07 sendita el Budapeŝto, la 27an de marto.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de UEA

# Niaj landoj – senprecedenca analizo

La tradicia loko por trovi informojn pri niaj Landaj Asocioj estas la Jarlibro. Pro ĝia limigita spaco, la informoj restis minimumaj. Sed reta versio de la Jarlibro ĝuas senliman spacon. Unuafoje en sia historio, UEA entreprenis projekton, kiu prezentas vastan gamon da informoj pri la lando kaj ĝia movado en sistema formato.

La projekto nomiĝas GAMO – Gvidilo por Aktivuloj Movadaj. Ĝi ja povas utili al iu ajn, kiu volas pli bone informiĝi pri la mondo de Esperanto, sed ĝi specife celas liveri al niaj aktivuloj utilajn informojn por povi formuli pli efikajn laborplanojn kaj agadojn, ĉu je landa, regiona aŭ kontinenta nivelo.

Vi povas aliri la dokumentojn de GAMO en la Asocia Retejo:

https://uea.org/asocio/gvidilo

Vi trovos ses nepezajn ilustritajn PDF-dokumentojn, kiujn vi povos legi ekrane aŭ elŝuti. Ili estas:

Enkonduko
Afriko
Ameriko
Azio
Eŭropo
Meza Oriento kaj Norda Afriko (MONA)




Ene de tiuj regionoj, la landoj plejparte aperas alfabete. La unua alineo donas geografiajn kaj ekonomiajn informojn pri la lando. La dua alineo prezentas la informojn, kiuj kutime aperas en la Jarlibro. La pliaj alineoj indikas la proporcion de membroj (IM kaj AM) kompare kun la popolo de la lando, ankaŭ la nuna membraro kompare kun la stato dek jarojn pli frue. Ĝi kunigas en unu lokon bazajn informojn, inter ili la: Landa Asocio, oficejo, kotizperanto, ĉefdelegito, aliaj asocioj (ILEI, TEJO), nombro de delegitoj kaj delegitaj urboj kaj internaciaj kongresoj okazintaj en la lando. Bv. viziti la retejon por rigardi la rezultojn. Informu min se vi havas elŝutajn problemojn aŭ vidas informojn, kiuj bezonas korektadon aŭ ĝisdatigon.

# AMO 45 en Marakeŝo, Maroko – riĉa programo

### Marto 31 (validas la vicordo )

- ***Renato Corsetti***: *Enkonduko al la kunveno kaj al Esperanto en Norda Afriko*
- ***Stefan MacGill***: *Enkonduko al la AMO-seminario] kaj prioritatoj por la magrebo.*
- ***Tatjana Loskutova***: *De Rusujo al Seulo - esperantista karavano*
- ***Mireille Grosjean***: *Limoj, ĉiaj limoj*
- ***Vasil Kadifeli***: *Kiam Norda Afriko parolis greke*
- ***Annie Grente***: *Leono, la afrikano*



### Aprilo 1

- **Prelego pri Al-Andalus**
- ***Abderrazzak Benchaabane***: Marakeŝo, ĝardena urbo, savenda havaĵo
- ***José Salguero***: *Juan Goytisolo, transkultureco transĝibraltara.*
- Vizito al la urba berbera bazaro kaj al la placo *Ĝama Al-fna (vidu la bildon).*

### Aprilo 2

- ***Eduard Kusters***: *Kiajn Medicinistojn Bezonas la Nuna Jarcento? La ĵuro de Hipokrato nuntempe*
- ***Maria Butan***: *La ATENDO, kiel formo de ekzisto*
- ***Frank Lappe***: *Kurseto pri medicina unua helpo por nefakuloj*

# AMO 46 en Nyanza-lac, Burundo

La Kongreso okazos de la 26a de marto ĝis la 1a de aprilo, ene de kiu okazos la AMO-seminario. Nyanza-lac troviĝas en la suda parto de Burundo, en la Provinco Makamba. La kongresa temo: ANEB post 12 Jaroj: Fortoj kaj malfortoj. ANEB estas la Landa Asocio en Burundo). La AMO-seminaria temo: Bona mastrumado de E-organizoj. Programeroj:




'Historio de Esperanto', Ntahonsigaye Hasani
Esperanto+, Jérémie Kapunu
Bona varbado, Jérémie Sabiyumva
Kiel fondi kaj disvolvi novan lokan E-klubon, Emile Malanda (kunordiganto de la Afrika Komisiono)
Financa evoluigo de lokaj kluboj aŭ kiel fariĝi finance memstara E-asocio, Emile Malanda
Kiel organizi kaj diskonigi eventojn – movade kaj ekstermovade, Ntahonsigaye Hasani
Strategio kaj taktiko por krei E-klubojn en lernejoj; universitato aŭ simila instanco, Jérémie Sabiyumva
Kiel eluzi Esperanton en turismo aŭ komerco, Emile Malanda

Okazos plie sesio de la Ekzamenoj UEA/ILEI kaj futbalmatĉo, kaj formulo de konkludoj.

Fotoj: La lago ĉe Nyanza; la tiama prezidanto de TEJO, Lukas Zebrowski, en Burundo en 2015





# Lingvaj muzeoj – esploroj el Norvegio

Mi ŝatus atentigi vin pri la libro “Language Museums of the World”, kiun Ottar Grepstad eldonis la 19-an de marto 2018.

http://www.aasentunet.no/iaa/no/sprak/Language+museums+of+the+world.d25-SxdfW2O.ips

http://www.aasentunet.no/filestore/PDF/Talar_og_artiklar/814-20180314LanguagemuseumsOG.pdf

Bernhard Tuider, Aŭstrio

# Afrika Bulteno kun freŝaj informoj

La unuaj tri monatoj de la jaro 2018 en la Afrika Esperantujo disvolviĝis eventriĉe, same kiel en la antaŭa jaro 2017! Dum tiu ĉi periodo okazis renkontiĝoj inter esperantistoj, prezento de Esperanto al ekstera publiko, E-kursoj, naskiĝo de novaj E-kluboj kaj multegaj aliaj agadoj, kiuj ankoraŭ montras la viglecon kaj diversecon de nia movado sur la kontinento. Al tiu entuziasmoplena Esperanto-vivo kontribuis aparte la benina junulara sekcio, fidelaj helpantoj de Afriko, membroj de la Afrika Komisiono k.t.p.  Bonvolu do teni vin informataj pri la plej freŝaj novaĵoj el Afriko... interalie, legante ĉi tiun informplenan bultenon!

http://www.esperanto-afriko.org/Esperanto%20en%20Afriko%20%20n-ro%2034.pdf

Vortoj: 670



ESPERANTO EN AFRIKO

Oficiala bulteno de la Afrika Komisiono de UEA

Numero 34 (2018: 1)

*Karaj gelegantoj,*

*La unuaj tri monatoj de la jaro 2018 en la Afrika Esperantujo disvolviĝis eventriĉe same, kiel la jus antaŭa jaro 2017!*
*Dum la daŭro de tiu ĉi periodo okazis renkontiĝoj inter esperantistoj, prezento de Esperanto al ekstera publiko, E-kursoj, naskiĝo de novaj E-kluboj kaj multegaj aliaj agadoj, kiuj ankoraŭ montras la viglecon kaj diversecon de la movado kaj portas la internacian lingvon Esperanto ĉiam antaŭen sur la kontinento.*
*Al tiu entuziasmoplena Esperanto-vivo kontribuis aparte la benina junulara sekcio, fidelaj helpantoj de Afriko, membroj de la Afrika Komisiono k.t.p.*
*Bonvolu do teni vin informataj pri la plej freŝaj novaĵoj el Afriko... interalie, legante ĉi tiun informplenan bultenon!*

*Ĝuan legadon al vi!*

***Adjévi Adjé***

************

**BOJE elpaŝis publike pri Esperanto en Benino**

S-ro Laïfo Kami Innocent Eteka, estrarano de Benina Organizo de Junaj Esperantistoj – BOJE, invitis semajnon antaŭe lernantojn de mezgradaj lernejoj al prelego pri Esperanto en la nordbenina urbo *Kandi*.

La 24-an de februaro 2018 la organizantoj kaj la invititoj renkontiĝis en *Business Promotion Center* – BPC sub la temo: *Première édition de la tournée nationale des jeunes Espérantistes Béninois pour la promotion de la langue universelle Espéranto.*

47 partoprenantoj, kies aĝoj estas inter 16 kaj 25 jaroj, de kvin mezgradaj lernejoj, favore respondis al la invito de s-ano Eteka. La okazaĵo daŭris de la 8-a ĝis la 20-a horo. Pro helpo de itala samideano, la organizantoj povis surtabligi meze de la tago sandviĉojn kaj trinkaĵojn al siaj gastoj.

La prelegantoj s-anoj Laïfo Kami Innocent Eteka, Cyprien Guiya kaj Mireille Hounkpe

Grupa foto de la partoprenantoj

prezentis pri: *Konciza historio de Esperanto, kial lerni Esperanton* kaj *atutoj de Esperanto.*

Dum la posta diskutado, la junaj kunvenintoj povis komuniki per *Facebook* kaj *WhatsApp* kun esperantistoj de aliaj landoj, samideano Olympe de Francujo kaj samideano Sunrise de Japanujo. La partoprenantoj uzis tre volonte tiun eblon.

El la entuziasmo de tiu ĉi arangô, fondiĝis kvin Esperanto-kluboj, po unu en ĉiuj invititaj

*Esperanto en Afriko numero 34*

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.